KAN KIKUĈI:

AMO DE TOOĴUUROO
kaj du aliaj teatraĵoj

EL LA JAPANA: JOŜIŜI ŜIMOMURA

ELDONIS: „LITERATURA MONDO“, BUDAPEST

KAN KIKUĈI:

AMO DE TOOĴUUROO

KAJ

DU ALIAJ TEATRAĴOJ

El la japana:
JOŜIŜI ŜIMOMURA

LITERATURA MONDO, BUDAPEST, 1934

— Kopirajto rezervita —

F. kiadó: Bleier Vilmos — Pestvidéki Nyomda Vácon — (F. Bénik Gyula)

KAN KIKUĈI

Kan Kikuĉi, la aŭtoro de la tri teatraĵoj entenataj en tiu ĉi volumo, naskiĝis en Takamacu, malgranda kastelurbo sur la insulo de Ŝikoku, en la dudek-dua jaro de Meiĵi (1889). Li estis studento de Kiota Imperia Universitato, studante anglan literaturon. Post la akiro de la diplomo, li laboris dum kelka tempo kiel raportisto de Ĵiĵi Ŝimpoo, unu el ĉefaj Tokiaj tagĵurnaloj, kaj fine konstruis sian vivon kiel literaturisto. Liaj publikigitaj verkoj ampleksas kelkajn ampleksajn romanojn kaj multajn kolektojn de mallongaj rakontoj kaj skizoj kaj tri volulumojn de kolektitaj teatraĵoj. Li nun loĝas en Tokio.

Studento de angla literaturo, Kikuĉi estas influita, oni diras, grandparte de Shaw kaj Galsworthy. Li akiris reputacion per siaj historiaj rakontoj, en kiuj sin trovas lia propra humaneco. Elprovinte sian plumon en ĉio ajn krom poezio, kiel materialon li uzas rakontojn same el la pasintaj tagoj kiel el sia propra sperto. Nek idealisto, nek moralisto li estas ekzakte, li estas homo kun edukita konscienco kaj sana vivkoncepto.

Li rigardas sian profesion tre alta kaj pretendas dignan respekton en lando, kie la verkisto suferas pro historiaj antaŭjuĝoj. Salutate de virinoj en iu kunveno antaŭ kelkaj jaroj, Kikuĉi pledis por la valoro kaj kultura kaj eduka merito de la literaturo kaj uzis iom fortajn vortojn pri la lando, kiu ne rekonas siajn verkistojn. Li demandis, kie en la tuta Japanujo eĉ unu strato portas la nomon de Ĉikamacu, la granda dramverkisto de la Tokugaŭa Epoko. Tio estas interesa demando, kvankam ĝi ne nepre pruvas la mankon de la takskapablo pri tiu literatura geniulo flanke de liaj samlandanoj. Sed rakonteto, kiun li aldonis, montras iasence, kiel la oficialuloj pensas

PERSONOJ:

Toojuuroo Sakata, ĉefaktoro ĉe Mijako Mandajuu Teatro, populare nomata »La Majstra ĉefartisto de la Tri Havenoj.«

Senju Kirinami, belaspekta juna aktoro, ĉefludanto de virinaj roloj.

Siroogoroo Nakamura, *Sanjuuroo Araŝi*, *Coojuuroo Saŭamura*, } aktorsteloj ĉe la sama teatro.

Genji Sodezaki, *Oojo Kirinami*, *Iĉija Sakata*, } ludantoj de junulinaj roloj ĉe la sama teatro.

Koheiji Hujija, *Ugenji Onogaŭa*, } ludantoj de junulaj roloj ĉe la sama teatro.

Jagoŝiĉi Sendai, komediisto ĉe la sama teatro.

Jirooemon Hattori, ludanto de kanajla rolo ĉe la sama teatro.

Kiĉizaemon Kaneko, dramverkisto ĉe la sama teatro.

Mandajuuza-no-Uakadajuu, posedanto de Mandajuu Teatro.

Reĝisoro.

Du aŭ tri scenej-helpantoj.

Multaj ludantoj de viraj kaj virinaj roloj.

Multaj servistinoj de la teejo Munekijo.

Okaji, edzino de la mastro de Munekijo, bela sinjorino proksimume kvardek jarojn aĝa.

Du aŭ tri statistoj.

Tempo — ĉirkaŭ la deka jaro de Genroku Periodo (1697).

Loko — Nakajima ĉe Sijoogaŭara en Kioto.

Sceno I.

(Vasta halo en la teejo Munekijo, apartenanta al Mijako Mandajuu Teatro ĉe Nakaĵima en Ŝiĵoo. Vespere en la fino de februaro. Interkonatiĝa festenkunveno de la aktoroj por la teatraĵo, prezentota en marto, estas aranĝata de la aktoroj de Mijako Mandajuu Teatro. Multaj arĝentaj kandelingoj, kun grandaj kandeloj flamantaj, staras en vico. Antaŭ la ornam-alkovo en la fundo, Tooĵuuroo Sakata sidas trankvile sur borderita kuseno el damaska silko. Li estas belaspekta, helvizaĝa homo kun hararo aranĝita en la formo de bambua te-kirlilo. Li vestis sin sube per robo el mus-kolora silkkrepo, kaj supre per »haorio«[1]) el nigra glata silko kun Kaga-blazono de tre malgrandaj duvizaĝaj pupoj surpentritaj en helaj koloroj, kaj lian talion ĉirkaŭvolvas larĝa zono speciale tinkturita per ĉina bruno. Dekstre de Tooĵuuroo sidas Senĵu Kirinami, la ĉefludanto de virinaj roloj ĉe la teatro. Li estas vestita per duobla robo el purpura silkkrepo sur vatita vestaĵo el blanka silko kaj, kun velura »haorio«, kaj purpura kamparana ĉapo, li estas bela kvazaŭ vera virino. Dekstre kaj maldekstre de ili sidas en linio Siroogoroo Nakamura, Sanĵuuroo Araŝi, Ĉooĵuuroo

1) speco de surtuto

Saŭamura, Genĵi Sodezaki, Oojo Kirinami, Iĉija Sakata, Ugenĵi Onogaŭa, Koheiĵi Huĵita, Jagoŝiĉi Sendai, Ĵirooemon Hattori kaj Kiĉizaemon Kaneko. Ĉe la finoj de la linio sidas servante la belaj junuloj, kiuj ludas la rolojn de junuloj kaj junulinoj. Mandajuuno-Uakadajuu ĉirkaŭiras inter la tasoj kaj teleroj servante la festenantojn.

Kiam la kurteno leviĝas, dum belaspekta juna aktoro batas man-tamburon, aliaj kvin kantas la jenan kanteton laŭ la melodio de Rjuutacu Buŝi:

Ĵurante al iu amon,
Ĵuru ne profunde kaj daŭrigu ĝisfine.
Vidu la foliojn de l' acero
Ĉu la malhelaj folioj falas,
Aŭ la helaj falas?
La malhelaj falas la unuaj.

Kiam la kanteto finiĝas, la aktoroj aplaŭdas per manfrapado. Glitpaperpordo ĉe la maldekstre flanko malfermiĝas kaj servistino de la teejo Munekijo envenas portante leterujon kun ruĝa glumarko.

Servistino: Letero venis por sinjoro Tooĵuuroo.

Uakadajuu (prenante ĝin duonvoje): Ŝajne estas urĝa afero. (Transdonas la leterujon al Tooĵuuroo.)

Tooĵuuroo (prenante ĝin): Ho, verŝajne estas urĝa afero. Tuj mi legos. Bonvolu ĉiuj pardoni min. Kio, kio! »Sinjoro Renŝi, de Sorin.« Jen, ĝi do estas letero de sinjoro Ĉikamacu! (Legas ĝin murmure kaj ĉe la fino altigas la voĉon.) »Ĉar ankaŭ mi estas maltrankvila pro la sekvanta dramo, mi sendas al vi liniojn tiamaniere per rapida kuriero. Se vi estus superita de sinjoro Ŝooĉoo, tio signifus ne sole vian malvenkon, sed ankaŭ malhonoron al la dramo de Kioto, la originala dramo. Mi tutkore petegas, ke vi faru

ĉiun penon por ellabori viajn planojn.« (Meditas momenton kaj legas denove.) ».... malhonoron al la dramo de Kioto...« — hum, neniam mi estos superata! (Ridas.) Sed tiu ĉi granda maltrankvilo de sinjoro Ĉikamacu estas plena de amo por tiu ĉi Tooĵuuroo.

Senĵu (kiel virino eĉ en la parolo): Jes, efektive, oni diras, ke eĉ la granda sinjoro Ĉikamacu mem turmentis sian cerbon dum tri tagoj kaj tri noktoj super tiu ĉi dramo. Vere, lian bonkorecon oni ne devas lasi nerimarkita.

Jagoŝiĉi (kun troigita gesto de komediisto): Jen kial tio ĉi estas la unika ama dramo de ĉiuj tempoj. Estas planite fari amaĵiston el sinjoro Tooĵuuroo, la plej granda diboĉulo sur la japana scenejo, per kompleta ŝanĝo de spirito. Se amo al publikulino estas amo de printempa nokto, tio ĉi estas amo de terure varma somermezo. Tio estas amo tiel arda, ke ĝi bruligus eĉ la korpon.

Ŝiroogoroo: Pli ol amo de somermeza tago, ĝi estas amo de terura vintra nokto. Ĝi estas vivriska amo.

Sanĵuuroo: Vivriska amo ĝi vere estas. Se la stelo falus, ĝi estus la terura, vivriska amo, kiu pelus homon sur la krucon en Aŭataguĉi.

Genĵi: Hieraŭ mi pasis tra Mijagaŭaĉoo, kiam du komercistoj, laŭŝajne vendistoj de parfumoj, iris antaŭ mi interparolante per laŭta voĉo. Ili diris entuziasme, ke sinjoro Tooĵuuroo, familiara kun ĉiuj artifikoj de amaferoj por fari virinojn malbonmoraj, certe surprizus la vizitantojn per sama lerteco en la rolo de amaĵisto.

Cooĵuuroo: Ankaŭ la nobeloj, kiuj diras, ke estas pli ol sufiĉe vidi Tooĵuuroo'n ĉiujare en la papervestoj

Moemon en tiu ĉi dramo. La vojo de amo estas neklarigebla. (Ridas.)

Uakadajuu (provante kaŝi sian malvigliĝon): La festeno estas melankolia. Venu, junuloj! Dancu grupodancon!

Tri aŭ kvar junaj aktoroj: Jes. (Ili stariĝas kaj komencas danci.)

(Tooĵuuroo silentas kaj ŝajnas provanta primediti private ian planon por la dramo, kaj, dum la atento de la kunuloj estas altirata de la danco, li ekstaras ŝtele. Li malfermas la glitpordon de la fundo kaj eliras kviete sur la koridoron. La junaj aktoroj daŭre dancadas. La frapado sur la man-tamburo fariĝas rapida kaj furioza. Ankaŭ la aktoroj fariĝas gajaj.)

Jagoŝiĉi (stariĝante kun komika gesto): Ankaŭ mi aliĝos al la dancantoj.

Ŝiroogoroo: Belaj junuloj kaj la kalvakapa sinjoro Jagoŝiĉi! Tio ĉi estas bonega kombino. Mi batos la man-tamburon.

(Jagoŝiĉi dancas kun la junuloj kun komika teniĝo. En la konfuzo de ilia unuiĝinta ridado, la scenejo ĉirkaŭturniĝas.)

Sceno II.

Apartigita salono ĉe Munekijo. Maldekstre, parto de la fluejo de Rivero Kamo estas videbla. Dekstre, kuŝas longa koridoro kondukanta en la ĉefkonstruaĵon. La brilo de silka nokto-lampo ĉarme iluminas la belajn garniturojn.

Kiam la kurteno leviĝas, Tooĵuuroo, kun falditaj brakoj, envenas laŭ la koridoro. De tempo al tempo li

haltas kaj enpensiĝas. Li apogas sin kontraŭ la kolono kaj meditas. Denove paŝante du aŭ tri paŝojn li provas fiksi simplajn pozojn. Fine li atingas la apartigitan salonon. Malfermante la glitpordon, li certigas al si, ke neniu estas tie kaj eniras kviete. Li prenas el la brusto de sia kimono ekzempleron de skribaĵo el la dramo.)

Tooĵuuroo (levante la skribaĵon provas diversajn pozojn): »Alveninte ĝis tio ĉi, eĉ se mi suferus turmentojn de fajro kaj akvo . . .« (Forĵetante la skribaĵon senespere, li prenas la kapon en la brakojn kaj falas en profundan mediton. Ŝanĝante la koron, li ekstaras kaj provas ĉirkaŭmoviĝi senvorte. Kvazaŭ estus tute neeble elpensi la pozojn, li eksidas kun la manoj sur la matoj malantaŭe kaj murmuras ion en mallaŭta ĝemeto. Fine kvazaŭ rezignante la provon portempe, li etendas la manon kaj, preninte brakapogilon el la alkovo, metas la dekstran kubuton sur ĝin kaj sin kuŝigas.

Dum kelka tempo okazas nenio. La frapado sur la man-tamburo kaj pligranda tamburo en la vasta halo de la ĉefkonstruaĵo malklare aŭdiĝas. Tooĵuuroo fermas la okulojn kviete. Subite ies pasado aŭdiĝas de la koridoro. Toĵuuroo malfermas la okulojn iomete, metas la skribaĵon sur la vizaĝon denove kaj ŝajnigas sin dormanta. Kiu aperas sur la koridoro, estas Okaĵi, la edzino de la mastro de Munekijo. Ŝi alproksimiĝas rapidpaŝe, kaj sen vorto de sinanonco glitmalfermas la pordon. Ŝi ekvidas Tooĵuuroo'n kaj surpriziĝas.)

Okaĵi: Ho, ĉu estas vi, sinjoro Too? Mi estis tre maldeca. Bonvolu min pardoni. (Tuj forironte, subite, kvazaŭ ĵus ekrimarkinte.) Vere, miaj servistoj estas tre malatentaj. Vi devas ne malvarmumi kuŝante tiamaniere en tia malvarma loko. Nu, mi metos litaĵon sur

mian amon laŭeble pli frue, sed pro mia juneco kiel aktoro kaj pro la severaj reguloj de mia ĉefo, mi ne povis agi laŭ mia volo. Dum mi kontentigis min per la kredo, ke fine mi povas ja fari nenion krom atendi mian tempon, kun la koro soleca, ardeganta pro la fajroj de la amo, vi, apenaŭ dudek-jara, jam fariĝis la amatino de sinjoro Seibei, la mastro de ĉi tiu domo. La kordoloro de tiu tempo, eĉ nun kiam mi ĝin rememoras, estas tiel granda, ke mi sentas, kvazaŭ ĝi disŝirus mian bruston. (Dirante tion, Tooĵuuroo dolortordas sian korpon, kvazaŭ li ne povus sidadi plu. Sed liaj okuloj solaj brilegas malvarme kaj li fiksas sian teruran rigardon sur la virinon por penetri en ŝian spiriton.

(Okaĵi duone levas la vizaĝon kvazaŭ iom trankviligita. Unu fojon paliĝinta, ĝi grade fariĝas iom ruĝa pro la reago. Ŝiaj okuloj brilas kiel fajro.)

Tooĵuuroo (daŭrigas, lia voĉo sola tremetas de arda pasio): Kvankam mi regis mian koron per mia tuta forto, sciante ke ami la edzinon de alia estas malbone, tamen la amo ne estis subpremebla. Kiam mi aŭdas pri vi kaj ekvidas vin, en la daŭro de dudek longaj jaroj mi neniam forgesis vin eĉ por unu tago. (Sin tenante pli supre ol sur la scenejo, kaj miksante la teruron kaj maltrankvilon de enamiĝinto al la edzino de alia, li premas sin pli proksimen al la virino terurita kiel malgranda birdeto.) Sed, kvankam mi estas flamema, ĉiam mi bridis mian koron amardantan tage kaj nokte, por ke ĝi ne faru la krimon ami la edzinon, de alia, sed nunjare mi jam estas kvardek-kvin. Mia vivo surtera estas jam finota. Kiam mi pensas, en kiu mondo, kaj al kiu mi ja povus diri tian amon, tian amon, portitan dum dudek longaj jaroj, se mi ne diros

al vi eĉ unu vorton pri tio, mia koro estas en tia malordo, kiu jam pelas min al frenezo. Aŭskultu, sinjorino Okaĵi, se vi kompatas al Tooĵuuroo, parolu eĉ unu vorton de kompato, mi petas! Sinjorino Okaĵi. (Tordiĝante freneze, li ŝovas sin proksimen al ŝi. Sed liaj okuloj solaj estas klaraj kiel klingo de glavo. Okaĵi abrupte ekploregas kaj falas vizaĝaltere.)

Tooĵuuroo (fikse rigardas Okaĵi'n kuŝantan tie plorante. Malvarma esprimo ludas ĉirkaŭ lia buŝo. Sed, malgraŭ tio, lia voĉo kaj liaj movoj estas plenaj de homa pasio kaj de amo): Aŭskultu, sinjorino Okaĵi. Ekkoninte la realan, malkaŝan koron de Tooĵuuroo, ĉu vi ne kompatas mian amon? Ĉu vi ne kompatas la amon portitan dum dudek longaj jaroj? Se ne, vi estas sensenta virino. (Okaĵi nur ploras singultante kaj ne respondas. Ambaŭ silentas kaj kelka tempo pasas. La voĉoj de karadrioj allogataj de la lumo, sonantaj kiel la kraketo de arĝenta tondilo, aŭdiĝas tuj proksime. Kvazaŭ mokante sin mem, Tooĵuuroo ridetas melankolie). Mi parolis tro maldece. Sed vi estas vere forta virino, traktante tiel malvarme la ardan amon de tiu ĉi Tooĵuuroo. Eĉ mi, senkompara amato sur la japana scenejo, veninte al vi estas forpuŝata, kvazaŭ malsaĝa sentaŭgulo. (Ridas.)

Okaĵi (subite levas la vizaĝon. Ĝi portas la lastan esprimon. Per mallaŭta kaj tre malforta voĉo.): Do, sinjoro Too, ĉion vi diris sincere, ĉu jes?

Tooĵuuroo (spite al si mem, ekstreme pala). Kiel mi povus min amuzi per vi? Mi parolas nun al la edzino de alia, mia amo do estas vivriska amo. (Li duone kaŭras kaj liaj genuoj tremetas malforte. Okaĵi ŝajne faris la lastan decidon, kaj ĵetante ekrigardon al lia vizaĝo per siaj flamantaj okuloj, ŝi neatendite bloves-

tingas la lumon en la silka nokto-lampo apud si. En la mallumo, terura hezitado kaj silento estas inter ili. Okaĵi, tremante en sia tuta korpo, atendas lian alproksimiĝon. Tooĵuuroo mem nun havas la okulojn suprentiritaj, kaj liaj kruroj tremas iomete. Fine li ekstaras. Li paŝas al Okaĵi. Ŝi ekstreme streĉiĝas. Sed Tooĵuuroo preterglitas malantaŭ ŝi kaj palpe eliras sur la koridoron.)

Okaĵi (perceptinte, ke li estas forironta): Sinjoro Too! Sinjoro Too! (Kriante tiel, sed tre mallaŭte, ŝi sekvas kaj provas reteni lin. Tooĵuuroo, vidante ke ŝi sekvas, fermas la pordon post si. Okaĵi kroĉas sin al la pordo kaj falas sin tordante kaj plorante. Tooĵuuroo, iom konfuzita, rapide forkuras kiel besto. La voĉoj de karadrioj aŭdiĝas miksiĝante kun la plorĝemoj de Okaĵi.)

Sceno III.

(Tago semajnon post la okazaĵo en Sceno II. Malantaŭ la scenejo en la Mijako Mandajuu Teatro. Dekstre vidiĝas la enirejoj al la vestadejoj de la aktoroj. La plej elstaranta inter ili estas tiu de Tooĵuuroo kun kurteneto portanta blazonon de floranta prunfloro. Ĝuste en la mezo troviĝas la ĉambro de rekvizitistoj. Maldekstre staras pordo kondukanta eksteren al la scenejo de la Mandajuu Teatro. Tie pendas helblua kurteno. Sur la ekstera scenejo la prezentado ŝajnas ankoraŭ ne komencita kaj la muziko de tamburoj, mantamburoj kaj flutoj estas aŭdata de tempo al tempo. Kiam la kurteno leviĝas, kvin aŭ ses aktoroj afereme rapidas tien kaj reen. La rekvizitistoj iras al la aktorĉambroj portante kostumojn, glavojn ktp.

Mandajuu-no Uakadajuu elvenas el la ĉambro de

Toojuuroo. Li apenaŭ ne kunpuŝiĝas kun la reĝisoro kaj salutas lin.)

Reĝisoro: Gratulojn! Hodiaŭ matene denove, jam antaŭ ol la sonorilo batis la sesan horon por malfermo, svarmas antaŭ la enirejo atendantaj homamasoj.

Uakadajuu: Estas bonege. Vere ĝi estas Toojuuroo! La virinoj de la gajkvartaloj diras, ke lia interpreto de amajisto estas absolute senmanka.

Reĝisoro: Pro tio, la homoj de la Hanzaemon Teatro devus resti gapaj pro surprizo. Kun tiu ĉi populareco, ni povos daŭrigi ne nur cent, sed eĉ du cent tagojn,

Uakadajuu: Ĉiuokaze estas bonege. Ĉiuj estu atentaj malantaŭ la scenejo. Nenio malbona okazu, mi diras. Ĝuste en tia plena teatro facile povas okazi tia malfeliĉo, kia fajro aŭ ŝtelo.

Reĝisoro: Jes, jes, mi komprenas.

(Ili disiĝas kaj iras dekstren kaj maldekstren. Homo, ŝajne komizo, venas kun metilernanto tra la enirejo maldekstra.)

Komizo (vokante la reĝisoron): Ha, mi petas, sinjoro. Kie estas la ĉambro de sinjoro Toojuuroo?

Reĝisoro: De kie vi venis? Lia ĉambro ĝuste estas tie.

Komizo: Mi estas komizo de Bizenja en Muromaĉi, Ŝijoo.

Reĝisoro: Ho, ĉu vi estas sendito de la granda magnato de Muromaĉi? Nu! Bonvolu eniri! Ĝi estas la dua ĉambro de maldekstre.

Komizo: Certe! La prun-blazono sur ĝi, ĉu ne?

(La komizo eniras la ĉambron de Toojuuroo. Siroogoroo Nakamura, vestita por la rolo de la paperpendajisto Iŝun, kaj Genji Sodezaki, en la rolo de

servistino Otama, venas el la ĉambro najbara al tiu de Tooĵuuroo.)

Ŝiroogoroo (kaptante la manikon de Genĵi kaj pozante iom). Mi nur tiun parton ne povas ludi, kiam mi amindumas al vi. Jam pasis tri tagoj, kaj mi ankoraŭ ne povas fiksi la pozon. Hieraŭ, kiam mi petis sinjoron Tooĵuuroo min helpi, li diris, ke estas plej necese ellabori mem sian aferon. Nu, antaŭ la kurtenleviĝo, ĉu vi ne bonvolus praktiki ĝin kun mi ankoraŭfoje?

Genĵi: Volonte. Kiom ajn, laŭ via volo. Sinjoro Tooĵuuroo ĉiam riproĉas nin severe, kiam ni petas lian helpon por nia okupo. »Ĉiu ellaboru mem sian aferon,« estas lia ĉiama respondo.

Ŝiroogoroo: Jes, la antaŭlastan jaron, kiam Kjooemon Jamaŝita, survoje al Edo, venis por adiaŭi al sinjoro Tooĵuuroo, li diris, »Mi faris vin mia modelo kaj sekve povis progresi multe en mia arto« kaj, kiel kutime, sinjoro Tooĵuuroo faris iom malserenan vizaĝon kaj rapidparole diris serioze eĉ sen rideto. »Kiu imitas alian, tiu neniel povas egali la alian. Ankaŭ vi penu per via tuta koro ellabori vian propran planon.« La tiama ĉagreno de Kjooemon ankoraŭ nun igas min ridi, kiam ajn mi memoras pri tio.

Genĵi: Ni ellaboru nian aferon, antaŭ ol ricevi la riproĉon de sinjoro Tooĵuuroo.

Ŝiroogoroo (subite alprenante scenejan pozon): Hola, mi ne lasos vin iri. Ĵaluzo iras kun edzino, kiel pipro kun makaronio, mi do ne zorgas. Kaj se mi estus pinĉita ĝis te-bruno, eĉ ne parolante pri purpuro, sur mia tuta korpo, kaj se tio estus nur pro vi, mi ne zorgus.

Genĵi (alprenante scenejan pozon responde): Fa-

ru, kion vi volas. Ĉar mi diros al sinjorino Osan. Ho, sinjorino! Sinjorino Osan!

Ŝiroogoroo (daŭre pozante): He, vi estas bruema. Cetere, Osan havas la buŝon de krokodilo, kaj, parolante pri buŝoj, buŝoj kaj buŝoj... (Subite revenante en aktoron.) Nur tiun ĉi parton mi ludas ne bone.

(De maldekstre envenas juna knabino kondukata de servistino de teatra teejo.)

Servistino: Ho, sinjoro Genĵi. Ni venis ĝustatempe. Jen rigardu, la filino de la posedanto de Oomija de Higaŝino-Tooin, pri kiu mi parolis al vi antaŭ nelonge.

Genĵi (bedaŭre rigardante Ŝiroogoroo'n): La kurteno tuj leviĝos, do bonvolu atendi ĝis alia fojo.

Servistino: Vere, vi parolas senkore. Bonvolu interŝanĝi kun ŝi almenaŭ kelkajn vortojn, ĉar ŝi estis tiel afabla veni ĉi tien malantaŭ la scenejon.

Genĵi (al la knabino nervoze): Vere vi estas afabla veni. (Ankaŭ la knabino honteme mallevas la kapon senvorte.)

Servistino: Nu, venu al mia teejo momenton. Nur momenton, ĉar tio ne bezonas tempon.

Genĵi: Mi ne povas. Tuj leviĝos la kurteno.

Servistino: Ĝi ne leviĝos ankoraŭ. Venu, venu, jen! (Prenas la manon de Genĵi kaj elkondukas lin maldekstren kun la knabino.)

(Jagoŝiĉi Sendai, en la rolo de Sukeuemon, envenas de dekstre kun tri aŭ kvar aliaj aktoroj vestitaj kiel komizoj.)

Unua Aktoro: La knabinoj de la lastaj tempoj devas esti observataj. Ili falas en amon kun aktoroj kaj venas kuraĝe eĉ en la aktor-ĉambron.

Dua Aktoro: Ĉiuokaze, sinjoro Sodezaki estas

servistino Otama, venas el la ĉambro najbara al tiu de Tooĵuuroo.)

Ŝiroogoroo (kaptante la manikon de Genĵi kaj pozante iom). Mi nur tiun parton ne povas ludi, kiam mi amindumas al vi. Jam pasis tri tagoj, kaj mi ankoraŭ ne povas fiksi la pozon. Hieraŭ, kiam mi petis sinjoron Tooĵuuroo min helpi, li diris, ke estas plej necese ellabori mem sian aferon. Nu, antaŭ la kurtenleviĝo, ĉu vi ne bonvolus praktiki ĝin kun mi ankoraŭfoje?

Genĵi: Volonte. Kiom ajn, laŭ via volo. Sinjoro Tooĵuuroo ĉiam riproĉas nin severe, kiam ni petas lian helpon por nia okupo. »Ĉiu ellaboru mem sian aferon,« estas lia ĉiama respondo.

Ŝiroogoroo: Jes, la antaŭlastan jaron, kiam Kjooemon Jamaŝita, survoje al Edo, venis por adiaŭi al sinjoro Tooĵuuroo, li diris, »Mi faris vin mia modelo kaj sekve povis progresi multe en mia arto« kaj, kiel kutime, sinjoro Tooĵuuroo faris iom malserenan vizaĝon kaj rapidparole diris serioze eĉ sen rideto. »Kiu imitas alian, tiu neniel povas egali la alian. Ankaŭ vi penu per via tuta koro ellabori vian propran planon.« La tiama ĉagreno de Kjooemon ankoraŭ nun igas min ridi, kiam ajn mi memoras pri tio.

Genĵi: Ni ellaboru nian aferon, antaŭ ol ricevi la riproĉon de sinjoro Tooĵuuroo.

Ŝiroogoroo (subite alprenante scenejan pozon): Hola, mi ne lasos vin iri. Ĵaluzo iras kun edzino, kiel pipro kun makaronio, mi do ne zorgas. Kaj se mi estus pinĉita ĝis te-bruno, eĉ ne parolante pri purpuro, sur mia tuta korpo, kaj se tio estus nur pro vi, mi ne zorgus.

Genĵi (alprenante scenejan pozon responde): Fa-

ru, kion vi volas. Ĉar mi diros al sinjorino Osan. Ho, sinjorino! Sinjorino Osan!

Ŝiroogoroo (daŭre pozante): He, vi estas bruema. Cetere, Osan havas la buŝon de krokodilo, kaj, parolante pri buŝoj, buŝoj kaj buŝoj... (Subite revenante en aktoron.) Nur tiun ĉi parton mi ludas ne bone.

(De maldekstre envenas juna knabino kondukata de servistino de teatra teejo.)

Servistino: Ho, sinjoro Genji. Ni venis ĝustatempe. Jen rigardu, la filino de la posedanto de Oomija de Higaŝino-Tooin, pri kiu mi parolis al vi antaŭ nelonge.

Genji (bedaŭre rigardante Ŝiroogoroo'n): La kurteno tuj leviĝos, do bonvolu atendi ĝis alia fojo.

Servistino: Vere, vi parolas senkore. Bonvolu interŝanĝi kun ŝi almenaŭ kelkajn vortojn, ĉar ŝi estis tiel afabla veni ĉi tien malantaŭ la scenejon.

Genji (al la knabino nervoze): Vere vi estas afabla veni. (Ankaŭ la knabino honteme mallevas la kapon senvorte.)

Servistino: Nu, venu al mia teejo momenton. Nur momenton, ĉar tio ne bezonas tempon.

Genji: Mi ne povas. Tuj leviĝos la kurteno.

Servistino: Ĝi ne leviĝos ankoraŭ. Venu, venu, jen! (Prenas la manon de Genji kaj elkondukas lin maldekstren kun la knabino.)

(Jagoŝiĉi Sendai, en la rolo de Sukeuemon, envenas de dekstre kun tri aŭ kvar aliaj aktoroj vestitaj kiel komizoj.)

Unua Aktoro: La knabinoj de la lastaj tempoj devas esti observataj. Ili falas en amon kun aktoroj kaj venas kuraĝe eĉ en la aktor-ĉambron.

Dua Aktoro: Ĉiuokaze, sinjoro Sodezaki estas

bonŝanca. Verŝajne estas ne malbone esti amata de tia urba virgulino. (Ridas.)

Tria Aktoro: Hola, muĝas la teatro. Tiom da homoj, ke ŝajne la teatro jam krevas.

Ŝiroogoroo (perdinte la kunulon staras gape): Mi deziras, ke Soocoo de Edo vidu ĉi tiun homamason.

Jagoŝiĉi: Jes, vere. Kompare kun ĉi tio, tia prezentaĵo kia Asamagatake estas infanaĵo.

Ŝiroogoroo: La fumo, leviĝanta de Asamagatake, jam baldaŭ estingiĝos. (Ridas.)

(Senĵu Kirinami, en la rolo de la bela Osan, elvenas kviete de sia ĉambro. Li estas akompanata de servisto.)

Jagoŝiĉi: Hieraŭ ie mi okaze aŭdis onidiron, ke post grandaj penoj por la plano de tiu ĉi dramo, sinjoro Tooĵuuroo amindumis al la edzino de teejo-posedanto, kaj akiris la sentojn kaj movojn de la amaĵisto, sed ĉu estas vero?

Ŝiroogoroo: Mi ne povas diri, ĉu estas vero aŭ ne, sed eble sinjoro Senĵu aŭdis. Ĉu la onidiro estas vero?

Senĵu: Ankaŭ mi aŭdis tian rakonton de homoj. Sinjoro Too tenas la buŝon fermita kaj diras nenion. Sed en tiu nokto de la festen-kunveno ĉe Munekijo, li estis turmentata por fari la planon por la dramo kaj forlasis sian lokon meze de la gaja ridado: kaj estis, post kiam vi falis sub la influon de drinkado, ke li iris al alia ĉambro, kaj ke li revenis la festenejon pala kaj senspira, kaj malplenigis tri aŭ kvar grandajn tasojn da rizbrando unu post la alia kaj diris, »Sinjoro Senĵu, lasu la zorgojn. Al mi venis ideo por la dramo.« Lia mieno havis teruran esprimon, kiu igis lin preskaŭ nerekonebla, kaj en tiu nokto... (Kiam Senĵu klinas sian kapon al unu flanko, li rimarkas

Okaĵi'n de Munekijo, venintan ŝtele tra la pordo maldekstra kaj ĉesas paroli.)

Jagoŝiĉi (en la maniero de komediisto): Hola, hola, ĝi estas sinjorino Okaĵi! Bonvenon! Permesu demandi, ĉu ne estis vi, kun kiu sinjoro Tooĵuuroo praktikis sian rolon de ĉi tiu dramo?

Okaĵi (streĉite, sed modeste): Kio? Via demando estas kvazaŭ klabo el densejo.

Jagoŝiĉi (ankoraŭ la komediisto): Oni diras, ke sinjoro Tooĵuuroo, por praktiki tiun ĉi ludon, faris trompan amon al la edzino de alia kaj, kiam li vidis ŝin cedinta, li forkuris. Ĉu vi ne havas ian ideon, kiu ŝi estas?

Okaĵi (modeste kaj trankvile): Eĉ se trompe, ricevi la amon de sinjoro Tooĵuuroo, estas la plej alta deziro de virina vivo.

Jagoŝiĉi: Bone dirite. (Ridas.)

Senĵu (iom flateme): Vere, se ĝi ne estus vi, kies reputacio de ĉasteco estas ĉiam alta, la suspekto trafus vin antaŭ ĉio. Ĉu vi havas ian aferon en la aktorĉambro? Bonvolu eniri.

Okaĵi: Jes, mi transportas la vortojn de gasto al sinjoro Sangoroo Araŝi.

Senĵu: Ho, do bonvolu eniri.

(Okaĵi klinsalutas kaj iras preter ili. Kiam ŝi ekiras al la vestadejoj vizaĝo al vizaĝo ŝi renkontiĝas kun Tooĵuuroo, elveninta de sia ĉambro. Momenton ili ambaŭ kuntiriĝas. Okaĵi donas al li facilan saluton per la okuloj kaj preterpasas. Tooĵuuroo momenton sekvas ŝin per rigardo returne.)

Ŝiroogoroo (vidante Tooĵuuroo'n elveninta): Ĵus nun ni parolis pri vi. Ĉu vi aŭdis famon pri ĉi tiu dramo, nun famekonata sur kaj ekster la scenejo?

Toojuuroo (konservante la aŭtoritatecon de la ĉefo de la kompanio): Eĉ ne unu vorton.

Jagoŝiĉi: Estas strange, ke vi, la fonto de la famo, ne aŭdis.

Senja: Estas pli bone ne diri al sinjoro Too.

Jagoŝiĉi: Eĉ se mi ne dirus, li aŭdus tiom iam, Sinjoro Toojuuroo, aŭskultu. Oni diras, ke por akiri ideojn por tiu ĉi dramo, vi amindumis al la edzino de alia.

Toojuuroo (ridante vigle): Kia malsaĝa demando! Kiam antaŭe mi prizorgis la vunditan militiston de Sangoroo Araŝi, oni diris brueme, ke mi estis tro lerta, kaj mi devus kompreni kirurgion. Estas la arto de aktoro ŝajnigi kvazaŭ li havus sperton, ĉu li havas, aŭ ne. Kiam li ludas la rolon de olevendisto, ĉu li havas sperton aŭ ne, montri la sentojn de olevendisto: jen estas la arto. Se oni ne povus ludi la rolon de amaĵisto sen sperto kiel amaĵisto, oni ne povus ludi la rolon de ŝtelisto sen sperto kiel ŝtelisto. Oni ne povus ludi la rolon de nobelo sur la scenejo ne spertinte nobelan vivon. Tio ja estas malsaĝa onidiro. La malsaĝa diro de skandalamantoj de Kioto! Estas neeble imagi, kian ĝenon kaŭzus tia kuranta famo al la edzinoj de miaj ĉirkaŭuloj. Ne forgesu nei tion.

Senju: Certe estas kiel sinjoro Too diras.

Jagoŝiĉi: Certe, certe vi estas Toojuuroo. Se oni devus havi aktualan sperton por ludi rolon, la aktoro vere ne povus esti aktoro, ĝis li unu fojon estis ĉio de reĝo ĝis lakeo. Certe jes, vere!

Komizo (venante el la ĉambro de Toojuuroo): Do, permesu adiaŭi.

Toojuuroo: Dankon pro via zorgemo. Bonvolu transdoni miajn altajn dankojn al la magnato.

(La komizo foriras kun la metilernanto. Ŝajne la kurteno jam tuj leviĝos; la scenejaj portistoj kaj provizaĵistoj iras okupite tien kaj reen.

Toojuuroo (sin turnante al Senju): Sinjorino Senju. En tiu sceno en mallumo, kiam la unuan fojon ni prenas la manojn, ĉu vi ne povus montri iom pli da ekscito, ĉar en tia okazo virino fariĝas ekstreme pli frenezema ol viro.

Senju (obeeme): Bone. Mi komprenas. Ĉar hodiaŭ la dramverkisto Monzaemon ĉeestas, mi metos mian tutan koron en tion.

Toojuuroo: Bone, post momento la kurteno leviĝos.

(Li prenas la manon de Senju kaj ekiras. Subite tumulto okazas en la aktor-ĉambro. La scenejaj portistoj kaj aktor-subuloj kuras al la ĉambro kriante, »Sinmortigo! Sinmortigo! Virino sin mortigis!«)

Reĝisoro (kurante en ekscito): Ha, vi ne devas fari bruon. Se la rigardantoj ekscitiĝos, la scenejo konfuziĝos. Kviete, kviete! (Sekvas malantaŭ la scenejon.)

Jagoŝiĉi (ankoraŭ iom frivole kiel komediisto): Hola, estas strange. Sinmortigo, kaj tiu de virino? Eĉ unu katino ne devis esti malantaŭ la scenejo.

Senju (same surprizite): Virino sin mortigis?! Kio? Virino sin mortigis!

(Toojuuroo, kvazaŭ diveninte la veron, fariĝas iom pala kaj silentas. Scenejaj portistoj kaj provizaĵistoj venas portante la kadavron de Okaji. De ĉiu flanko leviĝas la vortoj. »Estas Okaji de Munekijo.«)

Senju (alkurante en konsterno): Kio! La sinjorino de Munekijo! (Sin turnas al Toojuuroo, kvazaŭ subite diveninte. Toojuuroo rigardas flanken kvazaŭ

por eviti la okulojn de Senĵu.)

Jagoŝiĉi: Certe, ĝi estas la sinjorino de Munekijo! Unu ekpiko de ponardo sub ŝia brusto.

Ŝiroogoroo: Ŝi paroladis ĉi tie nur antaŭ momento, kaj nun, post ekpalpebrumo, jam la fino. Sinjoro Tooĵuuroo, rigardu; mi ne scias la cirkonstancojn, sed ĉi tio estas escepte belega fino por virino.

(Kvazaŭ altirate, Tooĵuuroo paŝas al la kadavro kaj fikse rigardas ĝian vizaĝon. Li diras nenion.)

Uakadajuu (enkuras spiregante): Kio estas? Kio, virino sin mortigis! Ho, ĝi estas la sinjorino de Munekijo. Povas esti ia kaŭzo, sed, malgraŭ ĉio, la aktorĉambro de la Mandajuu Teatro ne estas loko por sinmortigo.

Senĵu: Vere, estas ne bezone veni ĉi tien por morti. (Okaze ekrigardas la vizaĝon de Tooĵuuroo kaj dronas en silento.)

Jagoŝiĉi: Se tia malbonaŭspicia afero fariĝus vaste konata, ĝi povus vundi la nunan grandan popularecon de nia dramo.

Uakadajuu: Efektive, tio min maltrankviligas. Ĉiuj, bonvolu diri tion al neniu.

Tooĵuuroo (rigardas la kadavron silente, sed subite ŝanĝinte la humoron): Kio estas la kaŭzo maltrankviliĝi? Ĉu la populareco de la arto de Tooĵuuroo povus esti vundata de tia afero, kia la vivo de simpla virino? (Prenante la manon de Senĵu.) Venu, sinjoro Senĵu, al la scenejo.

Senĵu (ĝentile, kiel vera virino): Jes, bone.

(Tooĵuuroo forrapidas rekte al la scenejo, sed revenas denove, ekrigardas la kadavron kaj fine, decidinte foriras. Samtempe, la lignaj krakiloj por komenci la ludon sonas kaj la kurteno falas malrapide.)

PLI BONE OL VENĜI

PERSONOJ:

Saburobjoe Nakagaŭa, vasalo de Ŝoguno, havanta sian loĝejon ĉe Taŭaramaĉi en Asakusa. Ĉirkaŭ 50 jaroj.

Jicunosuke Nakagaŭa, filo de Saburobjoe kaj heredonto. En Akto I, 4- aŭ 5-jara. En Akto III, 26- aŭ 27-jara.

Iĉikuroo, en Akto I, servisto de la familio Nakagaŭa. En Akto II, rabisto. En Akto III, bonzo.

Ojumi, en Akto I, favorata konkubino de Saburobjoe. En Akto II, edzino de Iĉikuroo.

Junaj geedzoj vojaĝantaj.

Gonsaku, ĉevalisto.

Ŝtonhakistoj, Kamparanoj, Kamparanino ktp.

Tempo — Edo Periodo. La agado okazas inter la Epokoj Enkjoo kaj An'ei. inkluzive.

Loko — Akto I, Edo. Akto II, en Kiso Montaro. Akto III, Jabakei (pro oportuneco uzas la la nomon poste donitan).

Koncerne kostumojn kaj dekoraciaĵojn. Evitu tre pompajn novajn kostumojn, kiajn oni vidas sur elmontraj pupoj ĉe ŝtofvendejoj. La vestaĵoj estu rafinitaj, kaj ju malpli okulfrapaj ili estas, des pli bone. Kiel la scenejmuntaĵojn por Akto I, evitu la malmultekostan kaj freŝan, kia la domo de novriĉuloj.

AKTO I.

(La domego de Saburobjoe Nakagaŭa ĉe Taŭaramaĉi en Edo. Lunluma nokto frue en la aŭtuno de tria jaro de Enkjoo (1746).

Antaŭ la kurten-leviĝo kolera voĉo tondras: *Hundo! Senhonta Hundaĉo!* elingiĝo de glavo aŭdiĝas kaj bruo de rapide moviĝantaj piedoj. Kaj la kurteno leviĝas. La sceno prezentas la apartan pavilonon ĉe la domego de Saburobjoe Nakagaŭa. Maldekstre troviĝas bambua barilo, trans kies supro en iom granda distanco vidiĝas la ĉefloĝejo. Aŭtunaj herboj kreskas en la fronta ĝardeno. La pavilono estas ĉirkaŭata maldekstre kaj fronte de verando. Iom maldekstre estas ornamalkovo kun lakita kirasujo. Apud la alkovo staras bufedo kun du-folda ekrano staranta dekstre de ĝi. Kiam la kurteno leviĝas, Saburobjoe, grizkapa kaj svinganta longan glavon, penadas dishaki Iĉikuroo'n, Iĉikuroo, ŝirmante sin malantaŭ la ekrano, baraktadas por forkuri. La konkubulino, Ojumi, ŝtelmalfermante la glitpordon malantaŭ la ekrano, ŝajne intencas forkuri de tie.)

Iĉikuroo (per voĉo tremanta de malespero kaj fervoro). Pardonon, mia sinjoro. Mi ne estis mallojala. Absolute mi faris nenion mallojalan. (Protestante serĉas vojon por forkuri, sed ĉar la korto estas ĉirkaŭata

de barilo, ŝajnas, ke kurante tien li nur donus al li sia persekutanto eblon por ke li svingu sian longan glavon, do li daŭre senespere ŝirmas sin malantaŭ la kolono.)

Saburobjoe (per stertora kaj streĉa voĉo). Fermu la buŝon. Fermu la buŝon. Vi, malkuraĝa hundo, petegi la vivon de mi.

Iĉikuroo. Malvero ĝi estas. Malvero ĝi estas. Ĝi ja estas granda — Tia afero kun la sinjorino — Ĝi ja estas granda eraro.

Saburobjoe. Sufiĉe!

(Saburobjoe saltas antaŭen kaj, evitante la kolonon, ekbatas. Iĉikuroo elturniĝas dekstren. Saburobjoe retiras la glavon kaj bat-atakas de dekstre. Iĉikuroo elturniĝas maldekstren.)

Saburobjoe (incitite). Diablo!

(Saburobjoe ĉirkaŭiras la kolonon. Iĉikuroo ĉirkaŭiras kun li tri aŭ kvar fojojn, poste li fine elpeliĝas el la malantaŭo kaj, saltinte malsupren de la verando, unu fojon ĉirkaŭkuras en la korto. Sed la heĝpordo estas fermita. Se li haltus por ĝin malfermi, certe li estus batita de malantaŭe, li do turnas sin denove, preterlasas Saburobjoe'n kaj, suprensaltinte en la ĉambron denove, estas forkuronta tra la glitpordo, kiam lia mano okaze tuŝas kandelabron tie starantan. Ĝuste tiam Saburobjoe atingas lin kaj donas al li negravan gratajon sur lia ŝultro.)

Iĉikuroo. Ha! (Ekkriante en teruro, senkonscie ĉirkaŭsvingas la kandelabron en sia mano. La kandelo estingiĝas kaj, lumigata nur de lunradioj, la sceno fariĝas mallumeta.)

Saburobjoe. Hundo! Ĉu vi levas la manon kontraŭ via sinjoro, fripono! (Atakas lin pli furioze ol

antaŭe. Ili sin ĵetegas unu sur la alian sovaĝe kelkajn fojojn. Persekutita tre apude, Iĉikuroo nun estas en danĝero. La pinto de la glavo de Saburobjoe fine ekbatas lian vizaĝon apud la orelo.)

Iĉikuroo. Ho! (Kun krio de konsterno, li turnas sin senespere kaj komencas batali sovaĝe. Unue li ĵetas la kandelabron kontraŭ la atakanton. Batita de ĝia akra pinto sur la vizaĝo, Saburobjoe ŝanceliĝas. Intertempe, Iĉikuroo elingigas la glavon ĉe sia talio. Senvorta kaj senespera batalo komenciĝas. Saburobjoe suferas malavantaĝon havante longan glavon batantan la plafonon de tempo al tempo. Interbatalante ili alpremiĝas proksimen al la verando. Iĉikuroo, veninte sur la verandon la unua, sensingarde ekglitas kaj faletas sur unu genuon. Triumfe Saburobjoe levas la glavon por bati, sed, tro rapidante, li maltrafas kaj entranĉas profunde en la trabon kurantan super la kapo inter la ĉambro kaj verando. Ĝojigita de tiu ĉi ĉieldonita okazaĵo, Iĉikuroo, ankoraŭ sur unu genuo, batas per sia glavo liajn ripojn. Kun krio, Saburobjoe falas renverse.

Iĉikuroo, kiel homo batita ĝis sensento, sterniĝas sur la verando kaj restas tie, eligante mallaŭtan ĝemon.

Du aŭ tri minutoj pasas, dume escepte la ĝemadon de Iĉikuroo kaj la mortantan Saburobjoe'n, nenio okazas sur la scenejo. Iĉikuroo fine levas la vizaĝon kaj rigardas la ankoraŭ tremetantan korpon de sia mortinta mastro. Kiam la tremado tute ĉesis, subite, kvazaŭ pelata de memriproĉo, li reprenas la glavon kaj estas sin mortigonta tratranĉante la ventron. En tiu momento la ekrano en angulo de la ĉambro moviĝas. Ojumi aperas. Ŝi estas pala kaj iom tremetas, sed penas kaŝi sian internan panikon.)

Ojumi (rigardante okulangule al Iĉikuroo sin mortigonta). Vere mi timis pensante, kiel tio finiĝos. Mi staris malantaŭ la ekrano retenante la spiron kaj timante, ĉu ne estas jam mia vico, se vi estus disfendita. Mi estis tentata forkuri, sed mi havis senton de lojaleco al vi ŝajne mortigota. Sed vere vi estis bonŝanca, ĉu ne? Ankoraŭ vi ne estas ĉe la fino de via sorto. Veninte ĝis ĉi tio, ni ne devas perdi tempon senutile, tuj ni kolektu la tutan monon en la domo kaj forkuru. Oni ŝajne nenion rimarkis en la ĉefloĝejo, nun estas tempo prepariĝi. Venu, ni serĉu la monon en la domo.

Iĉikuroo (dum la virino parolas, jam forlasinta la ideon morti. Sed ankoraŭ li restas gapa kaj konfuzita.) Ha, mi faris teruran aferon. Perfide mi mortigis la mastron.

Ojumi (ne donante atenton al liaj vortoj). He, nun ne estas tempo lamenti. Vi ne estas vireca. Streĉu viajn fortojn. Mi pretigos min, dume vi serĉu la monon.

Iĉikuroo. Ha, estas terure. Mi estas mortiginto de la mastro. Mi mortigis la mastron, krimo puninda per krucumo.

Ojumi (provante lin levi). Ĉu vi ne batalis por via vivo je ĉiu risko? Jen, tuj vi devas esti preta.

(Iĉikuroo, kiel pupo en la manoj de la virino, stariĝas kaj, tenante sin fore de la kadavro de Saburobjoe, iras al la bufedo kaj komencas en ĝi serĉi. Sangaj fingroj lasas la makulojn glueme tie kaj ĉi tie sur la blanka vejnaro de *paŭlovnia* ligno. Ojumi iras en la najbaran ĉambron kaj baldaŭ revenas rapide kun pakaĵo kovrita per tuko.)

Ojumi. Kiom estas?

Iĉikuroo (per mallaŭta voĉo). Nur unu paketo de kvin rjooj[1] per niŝugin-aj[2] moneroj.

Ojumi (mem irante al la bufedo kaj bruserĉante inter ĝiaj enhavaĵoj). Kion ni povas fari per tiel malgranda sumo? Serĉu en la kirasujo. Tie povus esti mono por militiro aŭ alia.

Iĉikuroo (iom pli vigle ol antaŭe, malfermante la kirasujon kaj suprentenante la kirason kaj ĝin svingante). Ankaŭ tio ĉi estas malplena.

Ojumi (bedaŭrante). Li estis konata avarulo, ĝi do eble estus kaŝita en vazo aŭ io simila kaj enterigita. Ni ne povus trovi ĝin rapide. Venu, ni estu kontentaj per tio kaj ni foriĝu antaŭ ol iu nin vidos.

(Iĉikuroo purigas siajn sangmakulitajn manojn en pelvo kaj refirmigas la zonon.)

Ojumi (okaze turnante siajn okulojn al la kadavro de Saburobjoe). Tio ĉi estis mia mastro, de kies bonkoreco mi dependis ĉirkaŭ du jarojn. Do, mi montros mian respekton kaj adiaŭos. (Levas unu manon kaj sin klinas.)

(Iĉikuroo surgenuiĝas silente kaj kunpremas la manojn antaŭ la kadavro. Ili ekiras.)

Ojumi. Vi havas la ŝlosilon por la malantaŭa pordo, ĉu ne?

Iĉikuroo. Tio estas mia devo. Ĝi ĉiam estas ĉe mia talio.

Ojumi. Vi ĝuste estas tiu homo, ĉu ne? (Ridas alloge.)

(La lunlumo nun brilas pli hele. Kiam ili malŝlosas la heĝpordon kaj eliras, la voĉo de la nutristino aŭdiĝas kantanta en la ĉefloĝejo.

[1] Antikva japana monunuo, ĉirkaŭ 10 spesmiloj.
[2] Antikva arĝentmonero, duono de *rjoo*.

Kiomjara estas la fraŭlino Luno?
Dek-tri kaj sep.
Ŝi ankoraŭ estas juna.
Iru aĉeti teon.
Iru aĉeti oleon.

Per soleca voĉo malgranda knabo kantas la kanteton ripete.)

Iĉikuroo (kiam li ekiras el la heĝpordo, ĉarmite de la infana kanto.) Ha, ĝi estas la knabeto!

Ojumi (irante el la pordo.) Hola! Kion vi faras revante tie? (Forte tiras lian manon.)

(Ili eliras. Dum la luno brilas kaj la kantado daŭras en la domo, la kurteno falas malrapide.)

AKTO II.

Sceno I.

(Antaŭ la ripozejo mastrumata de Iĉikuroo kaj Ojumi ĉe montopasejo Torii sur landvojo Kiso. Du aŭ tri jarojn post la okazaĵoj en la Akto I. Vasta pajltegmenta domo kun terplanko okupanta ĝian dekstran duonon. La maldekstra duono estas muro. Sur la muro troviĝas pordo. Sur la duono de la terplanko, artemiziaj rizkukoj, fab-ĵeleo kaj sekigitaj persimonoj estas elmontrataj por vendi. Tie kuŝas du longaj benkoj, kaj sur la paperitaj glitpordoj estas skribitaj »Poligono« kaj »Varma Rizbrando.« La fono prezentas kriptomerian arbaron. Maljuna ĉerizarbo etendas siajn branĉojn super la domon. Ĝiaj burĝonoj estas ŝvelontaj.

Kiam la kurteno leviĝas, la ĉevalisto, Gonsaku, alliginte sian ĉevalon al kriptomerio apud la domo,

sidas sur unu el la benkoj kaj parolas internen al la butiko.)

Gonsaku. He, aŭskultu! Ne parolu tiel kruele. Konto estas konto, negoco estas negoco. En la printempo mi gajnos veton, kaj pagos por ĉio. Venu, ĉu vi ne volus ĉesigi la grumblon kaj pretigi por mi unu botelon? (Respondo ne venas.) He, aŭskultu! Neniu venos plu, se vi estas tiel malica. Kvankam restis ŝuldo, ĝi ne povas esti pli ol unu rjoo aŭ du buoj[1] pli. Kiam la vojaĝantoj iom plimultiĝos, tiel malgrandan sumon oni akiros per unu- aŭ du-taga laboro, ĉu ne?

Ojumi (ekster la vido). Se vi estus tia homo, kiu honeste alportus al mi la perlaboritan monon, mi fidus vin eĉ por kvin aŭ dek rjooj sen ia ajn vorto. Sed vi taŭgas por nenio, akirinte du buojn aŭ eĉ nur du ŝuojn[2], vi iros al Jabuhara por ĝin doni al malmultekosta publikulino, aŭ por ĝin vetperdi, ĉu ne?

Gonsaku (forlasante la benkon kolere.) Ne estu aroganta. Dank' al kiu estas eble, ke paro da friponoj kiel vi daŭre vivas maltime sub la vizaĝo de la suno? Fi, mi ne forgesas, estis la tagon post Higano en la antaŭlasta jaro, ke mi aŭdis pri hommortigo en tiu ĉi flanko de Jahubara; mi aliris kaj trovis, ke la mortinto estas maljuna vojaĝanto ĉirkaŭ sesdek jaroj. Kompatinde li estis prirabita je ĉio, de la vestaĵoj ĝis la vojaĝglavo, sed tabakujo falis kaj estis lasita malantaŭe. Ĝi ne estas posedaĵo de maljunulo, mi pensis, kaj kiam mi rigardis ĝin pli atente, mi supriziĝis. Mi sentis, ke mi vidis ĝin ie antaŭe. Esplorinte ĝin zorgeme, mi eksciis, ke la sento estis vera, ĉar ĝi estis

[1] Antikva monero, kvarono de *rjoo*.
[2] Antikva monero, kvarono de *bu*.

tabakujo fabrikita en Edo, malofte trovebla en la Kiso-Montaro.

Ojumi (ankoraŭ nevidebla.) Ĉu vi ne havigis al vi rizbrandon per tiu rakonto pli multfoje ol vi povas rememori? Se ĝi estas via rakonto, ankaŭ mi havas ion por diri. Mi ne memoras la daton ekzakte kiel vi, sed ĉiuokaze estis en la somero de la lasta jaro, kiam la pilgrimado estis ĝenerala kaj ĉiu kun ombrelo kaj bastono pasadis laŭ tiu ĉi vojo sinsekve. Iun vesperon malforta knabino de dekses aŭ deksep jaroj alkuris plorante, ni do envenigis ŝin kaj tiam ni trovis, kio estis la afero; nia surprizo estis granda. Ĉe la enirejo de montopasejo Torii, ŝin atakis ĉevalisto, kiu ŝin subpremis kaj rabis al ŝi la tutan monon, kiun ŝi kunportis por la vojaĝo. Kiam ni demandis, kiel li aspektis, ni eksciis, ke li havis brovojn densajn kiel raŭpoj kaj ——

Gonsaku (ridante maldolĉe.) Fi! Se ĝi estas via rakonto, mi havas ion por aldoni al ĝi. Tiun malfortan knabinon alkurintan plorante . . . kiu estis, kiu ŝin trompis per ŝajna bonkoreco kaj forvendis ŝin kiel servistinon de teejo en Hukuŝima?

Ojumi. Ĉu vi do pensas, ke mi havigos al vi ĉion laŭ via volo? Se vi venos kun saĝa materialo, ankaŭ mi renkontos vin kun la samo. Sed aŭskultu, Gonsaku, ĉu vi iam aŭdis la proverbon »Kiam vulpo estas kaptita, melo ne estas trankvila«? Mi ĉiam pensas tiel. Se iu devas iri en malluman ĉelon, ju pli multe da kompanio, des pli bone, vi scias. Vi aŭ tia homo, kiel tiu Tacuzoo en Narai, eble honorus min per tia amikeco, ĉu ne?

Gonsaku (forironte.) Ne minacu min. La plej malbona, kio povus okazi al mi, estus dumviva malliberigo. Mi ne povas toleri, ke oni min metu en la saman

vicon kun tiaj pendigotoj kiel vi ambaŭ. (Kolere malligas la ĉevalon kaj estas forironta.)

Ojumi (aperinte sur la terplanko la unuan fojon kaj formetante la tason uzitan de Gonsaku). Gonsaku! Ĉu vi ne havas eĉ monon por pagi la teon?

Gonsaku (montrante abomenon.) Trudpetemulino!

(Gonsaku foriras kun tintanta ĉeval-sonorileto. Kvankam iom banale, estas bone igi Gonsaku'n kanti la kanton, »Kiso Buŝi.« Ojumi ordigas la teilojn kviete. Dum ŝi agas tiel, Iĉikuroo elvenas el la pordo maldekstra sufokante oscedon. Sur lia vizaĝo vidiĝas iom pli da friponeco ol en Akto I, kaj li portas malnovan veston de flaveca silko ĉirkaŭvolvita ĉe la talio per tri-futa zono. Ekvidante lin, Ojumi parolas maldelikate.)

Ojumi. He, jam batis la oka horo. Eĉ se vi havas nenion por fari, vi estas tro mallaborema. Se vi ne streĉos viajn fortojn iomete kaj nun ne faros ion, ĉe ni ne restos plu eĉ simpla monero.

Iĉikuroo (ĵetante ekrigardon al Ojumi iom malbonhumore.) La suno estas varma, ĉu ne? Jam ĉio estas en printempo.

Ojumi (eksidante sur benko, komencas fumi.) Kion vi diras tiel ludeme? Post longa vintra vivado, ĉe ni restas preskaŭ neniom el la kvindek rjooj, kiujn vi akiris la lastan aŭtunon. Kvankam ne estus senbezone, ĉar ni duope fordrinkas ĉirkaŭ ses litroj da rizbrando ĉiutage.

Iĉikuroo (mallevante la kapon.) Ne tio estas la kaŭzo, sed lastatempe mia kapo estas tre peza kaj mi estas tiel malgaja, ke mi povas fari nenion. La prin-

tempa varmeto povas esti malbona por la sano anstataŭ bona, ĉu ne?

Ojumi (malpacience.) Prefere ol paroli tiamaniere, vi devus kolekti viajn fortojn, kiam bona birdo venas en vojaĝo.

Iĉikuroo. He, ĉu vi ne lasus min fumi?

(Ojumi transdonas sian tabakon kaj pipon al Iĉikuroo, kaj li ekkaŭras laŭ la muro apud la pordo kaj fumas. Junaj geedzoj en vojaĝo alproksimiĝas.)

Juna Edzo. Ha, ni jam devus vidi la urbeton Jabuhara.

Juna Edzino. Oni diris ĉe la montpiedo, ke se ni iros kvar kilometrojn supren, ni vidos ĝin malsupre.

Juna Edzo. Ĉu vi ne estas laca?

Juna Edzino. Ne.

Juna Edzo. Jen estas teejo. Ni ripozu minuton.

(Ojumi vidas ilin kaj salutas kun vizaĝo plena de rideto.)

Ojumi. Venu, bonvolu sidiĝi. Vi devas esti lacaj. Sur tiu ĉi vojo de montoj kaj montetoj, vi devas trovi la vojaĝon tre malfacila kun malforta kunulino.

Juna Edzo (sidiĝante kun sia edzino.) Mi aŭdis, ke tiu ĉi montopasejo estas la plej kruta loko dum la vojo; ĉu ĝi iras malsupren de ĉi tie?

Ojumi. Jes, jes. Tiel ĝi iras. Rigardu, ĉu vi ne vidas, kie la valo malfermiĝas kaj la tritikaj kampoj etendiĝas?

Juna Edzo (ekstarante sur la piedpintoj.) Efektive.

Ojumi. Tiu linio de pinoj en la mezo estas la landvojo kondukanta al Jabuhara. Rigardu, rigardu, vi vidas tiun grandan tegmenton brilantan en la post-

tagmeza sunbrilo, ĉu ne? Tio estas la templo Mjoohonji ĉe la enirejo al la urbeto.

Juna Edzo. Certe, mi vidas. Ĝi ne povas esti pli ol ok kilometrojn malproksima, ĉu ne?

Ojumi. Ok? Ne tiom; apenaŭ pli ol kvar. Eĉ se vi prenos sufiĉan ripozon, facile vi estos tie antaŭ la sesa.

Juna Edzo. La speciala produktaĵo de Jabuhara estas la kombilo nomata Orokuguŝi, se mia memoro ne eraras, ĉu ne?

Ojumi. Jes, ĝi estas. Vi devos aĉeti multon da ili revenvoje.

(Dum ili parolas, Ojumi preparas teon kaj prezentas kukojn. La Juna Edzino rigardas returne de tempo al tempo maltrankvile Iĉikuroo'n.)

Ojumi. Kaj kiel longa estas via vojaĝo?

Juna Edzo. Jes, post vizito al Ise Sanktejo por preĝi, ni intencas vojaĝi al Kioto por vidi la famajn łokojn, kaj se la cirkonstancoj permesus, ni povus ĉirkaŭiri al Jamato.

Ojumi. Koncerne la tempon kaj la monon, tio estas bonega plano. Sed malgraŭ ĉio, ŝajne vi ne havas kun vi serviston.

Juna Edzo. Kien ajn ni iras, oni diras tion kaj miras; la fakto estas, ke ni ekvojaĝis kun zorgema servisto, sed li malsaniĝis, kiam ni alvenis la kastelurbon de Macumoto kaj, ĉar kostas sufiĉe multe por venigi alian, ni lasis lin ĉe gastejo kaj pluiris.

Ojumi. Post ĉio, esti solaj estas al vi pli oportune.

Juna Edzo (returne rigardas la edzinon kun sensignifa rideto). Nun ni havis ripozeton, venu, ni do ekiru. Ankoraŭ unu paŝon plu.

Ojumi. Bonvolu ripozi libere. La suno estas alte.

Juna Edzo. Estas oportune alveni la gastejon frue. Ni multe vin ĝenis. Jen, mi metis monon por teo ĉi tie. (Ekiras.)

Ojumi. Dankon. Bonvolu denove viziti revenvoje. Bone vin gardu dum la vojo.

(Ojumi staras kelkan tempon sekvante ilin per rigardo. Iĉikuroo daŭre fumadas sonĝeme. Ojumi, kvazaŭ subite ekrimarkinte ion, kuras en la domon kaj tuj elkuras denove kun mallonga glavo de Iĉikuroo.)

Ojumi (eltenante la glavon ĉe lia ŝultro). Jen! Iru!

Iĉikuroo (malbonhumore, kvazaŭ ne rimarkinte, kion ŝi volas.) Ki..ki..kion vi volas?

Ojumi (kun iom maldelikata tono.) Ne ŝajnigu, ke vi ne komprenas. Jen estas laboro! Ĉu ĝi ne estas grava laboro?

Iĉikuroo (montrante abomenon.) Kio? Tiujn homojn? Vi estas senkora. (Ekstaras kvazaŭ por ŝin forpuŝi.)

Ojumi. Kiu estas senkora? Ĉu ne ĝuste vi mem estas tia? Ĝuste nun, dum mi malpacience penadis ĉiamaniere teni ilin eĉ iomete pli longe, vi sidis tie fumante kiel kameno. Iru! Ne hezitu, rapidu senprokraste.

Iĉikuroo (iom forte.) Ho! Mi malŝatas tion. Tio dependas de la homo. Eĉ se tio estas mia okupo, forsendi de la mondo tiel feliĉan paron, kiel ili, estas tro kruele.

Ojumi. Se ni diradus kiel vi, ke ni ne ŝatas maljunulojn, knabojn aŭ geedzojn, nia afero estus jam finita. Nenio estas pli ĝena ol buda-kora ŝtelisto. Ankaŭ

vi pripensu bone. En la pasintaj tagoj, mi mem ne estis tiel malŝatinda virino. Pro kio en la mondo estas, vi pensas, ke mi, antaŭe tiel famekonata en la kvartalo Asakusa, ke oni eĉ nomis min Belulino de Umamiĉi, rampis profunde en la Kiso-Montaron kaj vivas tiel mizeran vivon, kian eĉ sovaĝa simio ne vivus? Ĉu ĉio ne estas nur, ĉar mi havas vin, la kanajlan mortiginton de sia mastro, kiel edzon?

(Iŝikuroo staras silente kun mallevita kapo.)

Ojumi. Rekompence por mia vivo kun vi, kredeble ne estas de vi krimo doni al mi tri manĝojn ĉiutage kaj rizbrandon de mi ŝatatan, ĉu ne?

Iĉikuroo (iom kolere.) Ne parolu aroge. Se vi havas ion por diri, ankaŭ mi havas la samon. Mi, la fidela kaj zorgema servisto de mia sinjoro, kiu, fininte la jarlimon de servado senkulpe en la Nakagaŭa-domego, estus fariĝinta pensiulo en la mastrumado, estas delogita kaj, ho, terure! Kiu en la mondo estis, vi pensas, kiu igis min levi la manon kontraŭ mia mastro?

Ojumi (mokridante.) Hm! Sensencaĵo! Ĉu tio estas mia kulpo, ke vi freneziĝis pro mi? Estas pli bone ne paroli pri tia pasintaĵo. Ĉu oni ne diras, ke trinkante venenon, oni ĝin eltrinku ĝis la lasta guto? Kion vi deziras, tio estas: drinki dolĉan rizbrandon ĝis vi dronos en ĝi, ĉu ne? Ĉiukaze, ĉu ĝi ne estas la sama glavo, per kiu vi mortigis vian sinjoron? Via krimo apenaŭ povus esti malpligrandigita nun per ŝparo de unu vivo aŭ du. (Iom flateme.) Cetere, vi ne bezonas ilin mortigi. Laŭ lia aspekto, li estas naiva filo de riĉulo, tial eĉ se vi ne faros kruelaĵon, se vi simple minacos lin per nuda glavo, estos bagatelo rabi ĉion de li. Pensu pri tio! Senspertaj vojaĝantoj kun kvindek rjooj aŭ cent pretaj en sia poŝo ne alvenas tre ofte.

Kaj kion mi volas, estas la punktita silkokrepo, per kiu la virino sin vestis! Mi volas provi, kia sento estus vesti min per tia speco de vesto unu fojon.

Iĉikuroo (fine prenante la mallongan glavon de Ojumi.) »Al diablino, diablo kiel edzo,« oni diras, sed via diableco estas du aŭ tri gradojn super la mia. Nenio helpas. Mi do iros.

Ojumi (ridante donas al Iĉikuroo resonantan frapon sur la dorson.) Vi estas bonulo, ĉu ne? Ŝajnigi vin ĝenata!

Iĉikuroo. Alportu rizbrandon. Malvarma sufiĉas.

Ojumi. Prenu ĝin reveninte. Mi preparos varman.

Iĉikuroo. Alportu, mi diris.

Ojumi (eniras kaj elvenas kontraŭvole kun rizbrando.) Se vi pensas tion bedaŭrinda aŭ simila, verŝajne vi faros ian malsaĝan eraron.

Iĉikuroo (senvorte trinkegas avide el la ŝtoptruo de la bareleto.) Ha, estas amara rizbrando. (Ĵetante la bareleton surteren li forrapidas.)

Ojumi (rigardante lin forirantan.) Ĉar ili estas survoje al Kioto post vizito al Ise, ili devas kunporti almenaŭ kvindek rjoojn. Ankoraŭ estas malvarme, kiam la suno eksubiras. (La sonorilo de surmonta templo aŭdiĝas.) Ho, ĝi devas esti la sonorilo de la sesa.

(La kurteno falas malrapide.)

Sceno II.

(Iom post la okazaĵoj en Sceno I. La sama loko kaj la sama domo. La scenejo estas kiel tiu en Sceno I. turnita dekstren. Interna ĉambro en la ripozejo. Ankaŭ maldekstre troviĝas enirejo. La luno lumas ekstere. Ojumi, sola sidante mallaboreme, elprenas

ŝamisenon* kaj ludas ĝin per siaj ungoj. Kiam la kurteno leviĝas, tuj kordo rompiĝas kaj ŝi ĵetas la ŝamisenon de si maldelikate. Ŝi altiras tabakon kaj fumas malespere.

Iĉikuroo envenas. Li portas paketon da vestaĵoj sub sia brako. Li rigardas returne de tempo al tempo. Kiam li venas al sia domo, li sidiĝas sur la sojlon kun ĝemo de trankviliĝo.)

Ojumi (aŭdante per akraj oreloj). Kiu? Kiu estas? Ĉu estas vi? Ĉu estas sinjoro Iĉikuroo?

(Iĉikuroo sidas silente kaj ne respondas.)

Ojumi (ekstarinte.) Kiu estas? Kiu estas? (Malfermas la paperitan glitpordon.) Kio! Jen estas vi tamen, ĉu ne? Ne sidu ludeme sur tia loko, sed venu en la domon rapide. Vi estis pli rapida ol mi pensis.

(Iĉikuroo eniras. Sed ankoraŭ li diras nenion.)

Ojumi. Kiel iris la afero? Sukcese? (Prenante la vestaĵojn de Iĉikuroo kaj rigardante ilin.) Ha, mi ne trovas ŝiraĵon sur ili. Vi fariĝis tre sperta, vere? Ho, estas belega krepo, ĉu ne? Kiel ajn bonkvalitaj estus la aferoj, se ili estus surŝprucitaj per sango, eĉ mi forta ne povus porti ilin; sed nu, aranĝu vin komforte. Varma rizbrando jam estas preta, ĉu vi do ne prenus taseton, dum vi rakontos al mi ĉion?

Iĉikuroo (morte pala, eksidante senvorte). Ha, mi estas laca.

Ojumi. Ho, vi, ankoraŭ vi estas malgaja, ĉu ne? Ĉu vi mortigis ilin tamen? Tio estas multe pli certa kaj lerta maniero.

Iĉikuroo (peze balancante la kapon denove kaj denove). Ha, mi estas malsana. Mi intencis nur sekvi kaj minaci ilin, sed la virino freneziĝis kaj kriis, »Jen

* Japana kordinstrumento